

Esperanto en Danio

22-a jarkolekto • n-ro 3 • aŭgusto 2015



Manifestacio en Bulonjo-ête-Maró

Esperanto en Danio

membroorgano de
Dana Esperanto-Asocio

ISSN 0909-6124

Adreso de la asocio/prezidanto:

Ileana Schrøder

Vestavej 4, 2770 Kastrup

☎ 32 51 31 16 dea@esperanto.dk

Ĝirokonto: 1551-805 7370

UEA-kodo: deaa-t

Kromaj estraranoj:

Arne Casper Mortensen (kasisto)

Finn Østerbæk (vicprezidanto)

Jens S. Larsen (sekretario)

Bent Jensenius

Peter Wraae

Filippo Botta

Redakcia adreso:

Jens S. Larsen

c/o Trillingsgård, Munkebjergvej 77

2770 Kastrup

☎ 52 64 44 72 eed@esperanto.dk

Presado:

DDFO

Adresŝanĝoj al:

La prezidantino (adreso supre)

Represo de artikoloj el EeD estas permesata kun indiko de la fonto.

Limdato por la venonta numero:

01.11.2015

Enhavo

Neforgesebla historia UK.....3
Forpasis Lars Kromann.....4

Kongresanoj el Lillo pilgrimis
al Bulonjo.....5
Zamenhof-letero aŭkciita por
1100 eŭroj.....7


Mil dankoj pro la centa
kongreso.....9
Ĉu Esperanto finfine iĝas ĉef-
flua lingvo?.....12
Komentoj de la redakcio.....14

Kunvenoj en Kopenhago.....16
Kolokvo pri Esperanto-
instruado.....18
Pri la ILEI-konferenco.....19

Medalo pro Esperanto.....24
Aktivaj skoltoj.....24
Recenzeto.....26
UEA en grava forumo de
Unesko.....27

*Sur la foto frontpaĝe videblas s-ro
L.C. Zaleski-Zamenhof (nepo de
Ludoviko Zamenhof), Xavier
Dewidehem (prezidanto de LKK),
Frédéric Cuvillier (urbestro de
Bulonjo) kaj Mark Fettes
(prezidanto de UEA).*

Neforgesebla historia UK



Pasis nur iomete pli ol unu semajno, kaj miaj impresoj estas ankoraŭ fortaj en la memoro. Jes, oni ne povos forgesi tiun mirindan eventon, kiu konfirmis la dediĉon de nia estanta movado al la historiaj eventoj de pli ol cent jaroj.

La UK en Lillo estis memorinda pro siaj kvalitaj programoj, ene kaj ekster la kongresejo, la afiŝoj kiuj ornamis la urbon, la abunda kvanto de kongresanoj, sed eĉ pli kortuŝa estis por mi la preskaŭ pilgrima vojaĝo al Bulonjo ĉe Maro, kies centro de la urbo ni kune kun la urbestro trapasiss en procesio.

De tempo al tempo necesas konfirmi la apartenecon al tiu nia granda familio, kiel nia prezidanto Mark Fettes emfasis dum unu el siaj brilaj paroladoj. En tiuj brila momentoj oni diskovras la taŭgecon de nia komunumo kaj sentas sin fieraj apartenante al tiu movado.

Alia kortuŝa momento estis la adiaŭo al nia longodaŭra direktoro de la Centra Oficejo, sed samtempe konsciante ke la taskoj postulas novajn junajn fortonj por daŭrigi la laboron. Tial ni bonvenigas la novan direktorinon Veronika Poór kaj deziras al ŝi multajn fruktodonajn jarojn!

Sumo de 7 650 kronoj estis kolektita de 15 el niaj membroj favore al la viktimoj de la tertremo en Nepalo. Ni elkore dankas!

Forpasis Lars Kromann

Denove unu el niaj malnovaj kaj fidelaj membroj forlasis nin. Lars Kromann mortis la 9-an de junio en la hospitalo de Køge.

Lars laboris dum multaj jaroj kiel vicdoganista inspektoro en Næstved, kie li loĝis ĝis 1993, kiam li edziĝis al Bente kaj translokiĝis al Fakse.

Lars kaj Bente estis laboremaj membroj de la klubo en Næstved, ĝis ĝi bedaŭrinde devis ĉesi. Multajn fungekskursojn Lars aranĝis – kelkfoje kune kun Pout Thorsen – kaj kvankam ni nur malofte trovis fungojn, ni ĉiam povis gustumi la hejmfaritan spican brandon de Lars.

Ankaŭ la landa organizo profitis de Lars. Li estis esrrarano, jam kiam la nomo estis CDEL aŭ Centra Dana Esperantista Ligo. El la lastaj jaroj mi memoras Lars kiel direktanton en ĝeneralaj kunvenoj kaj gvidanton de la korespondaj kursoj, tasko kiun li transprenis de Svend Dragsted. La retpaĝoj de DEA estis korinfano de Lars, feliĉe oni klopodas daŭrigi lian laboron per tiuj.

Lars naskiĝis la 24-an de marto 1932 kaj vivis parton de sia frua vivo en Spjellerup ĉe Karise. En la preĝejo de Spjellerup ni lastfoje adiaŭis nian karan amikon Lars.

Grethe Nielsen

Kongresanoj el Lillo pilgrimis al Bulonjo

Unu el la pintaj eventoj de la Kongreso estis la evento ĉe Bulonjo. Jen la informo de la vicprezidanto Stefan MacGill pri la solenaĵo:

Kvankam ekstere rekonstruita, la interno de la urba teatro de Bulonjo-ĉe-Marŝo certe aspektas nun, cent dek jarojn poste, kiel en la historia tago en 1905, kiam Zamenhof festparolis por la partoprenantoj de la Unua Kongreso de Esperanto. Ses aŭtobusplenoj da kongresanoj pilgrimis al la apudmara urbo por solene omaĝi al tiu unika evento.

Sur la teatra podio sidis la Prezidanto de UEA, Mark Fettes, s-ro L.C. Zaleski-Zamenhof, nepo de Ludoviko Zamenhof, Xavier Dewidehem (prezidanto de LKK). Salutis s-ro Luc Tassart, respondeculo pri Internaciaj Rilatoj por la urbo Bulonjo, kaj la vicurbestrino, s-ino Odette Caerou.



Rivelo de Zamenhof-busto en Bulonjo

Brian Moon laŭtlegis la tutan prelegon de Ludoviko Zamenhof el la 5-a de aŭgusto, 1905. Ĝi emfazis la egalrajtecon de la bulonjaj kunvenintoj, kontraste al similaj tiamaj internaciaj renkontiĝoj, kie nur privilegiita minoritato havis la necesajn lingvajn kapablojn por komuniki. La espe-

rantistoj rilatas inter si kiel fratoj kaj egaluloj, ne kiel landanoj superregaj kaj humiligataj. En malpli konata parto de la alparolo, Zamenhof esprimis sin pri Johann Martin Schleyer, la kreinto de Volapuk, pri kies laboremo Zamenhof esprimis dankon, eĉ se lia projekto jam montris sin maltaŭga por la bezonoj de arta lingvo. Li plie omaĝis al pioniroj, kiuj jam forpasis en la tiam 18-jara historio de la lingvo, inter ili Wilhelm Trompeter. La finon de la alparolo konsistis el rimforma preĝo al ‘supera forto’.

Louis C. Zaleski-Zamenhof diris: “La vortoj de mia avo estas kortuŝaj por mi, precipe la parto pri francoj, angloj, rusoj kaj poloj. Mi ja estas franco kaj polo, sed super ĉio, mi estas homo kaj frato de aliaj homoj.”

Jen resumo de la alparolo de Mark Fettes: Esperanto ja estas lingvo sen teritorio, oni ofte demandas: kie oni parolas tiun lingvon? Ĝi apartenas al neniu nacio, apartenas al neniu specifa loko. Esperanto estas la propraĵo de ĉiuj homoj, kiuj deziras ĝin uzi por komuniki. Li parolis pri la signifaj lokoj por nia komunumo. Inter tiuj Bulonjo – la lulilo de la lingvo. Ĝis tiu unua kongreso, multaj ne aŭdis la parolatan lingvon, krom eble inter kelkaj samlandanoj. Bulonjo markas la transiron de Esperanto de ĉefe skriba lingvo al ĉefe parola lingvo. Lulilo ankaŭ pro la starigo de la Lingva Komitato, kiu poste fariĝis la Akademio de Esperanto. Lulilo de la internacia komunumo; ĝis tiu jaro la parolantoj organizis sin en urbaj kluboj kaj landaj asocioj. Ekde Bulonjo la komunumo fariĝis iom-post-iome transnacia. La plej junaj kongresanoj en Bulonjo estis Edmond Privat kaj Hector Hodler, kiuj ambaŭ diversmaniere kontribuis forte al tiu internaciigo. Hodler tri jarojn post tiu unua UK fondis Universalan Esperanto-Asocion, sekve tre rekte Bulonjo estas ankaŭ la lulilo de UEA. Lulilo ankaŭ de la Esperanto-kulturo, kiu garantias ĝian vivipovon. Fine, li dankis al la urbo pro la impona akcepto.

Post la solenaĵo, la kelkcentthoma publiko per abundaj flagoj kaj banderoj, promenis tra la urbocentro ĝis la stacidomo, kie Zamenhof kaj aliaj eltrajniĝis por la unua kongreso. Tie staras monumento pri tiu evento.


Okazis ceremonio en kiu oni malkovris novan ŝildon por memori pri la nuna vizito kaj metis florkronojn. Kunpromenis la Alta Protektanto de la Kongreso, s-ro Frédéric Cuvillier, eksministro, deputito kaj urbestro de Bulonjo-ĉe-Mar, kiu partoprenis la ceremonion kaj poste akceptis la kongresanojn en la urbodomo.

Memorinda tago entute.



Zamenhof-letero aŭkciita por 1100 eŭroj

La tradicia kongresa aŭkcio atingis unu el la plej bonaj rezultoj en sia historio. Sub la verva gvido de Humphrey Tonkin en la plenplena salono Lapenna kolektiĝis entute 4025 eŭroj. Pli bonan rikolton, 4528 eŭroj, oni atingis nur en la 83-a UK en Montpeliero en 1998. Kun 3579 eŭroj la aŭkcio de la 94-a UK en Bjalistoko en 2009 estas sur la tria loko.



Kiel atendite, plej altpreze estis vendita letero, per kiu L.L. Zamenhof kaj Klara Zamenhof dankis al ges-roj Arnhold pro ilia gastigado dum la 4-a UK en Dreseno en 1908. En febra konkurso inter multaj interesatoj la letero fine estis vendita por 1100 eŭroj.

La dua plej kosta aŭkciaĵo estis la honoro esti registrita kiel kongresano n-ro 1 en la 101-a UK en Nitro. Por ĝi necesis pagi 210 eŭrojn. La Kongresa Libro de la 7-a UK en Antverpeno en 1911 kostis 150 eŭrojn, dum la plej malnova aŭkciaĵo, *Langue internationale Esperanto. Manuel complet* de Louis de Beaufront el 1899, kun lia aŭtora dediĉo al generalo Sebert, vendiĝis por 140 eŭroj. Por la raporto de L. Couturat kaj L. Leau pri la laboroj de la misfama Delegitaro, *Compte rendu des travaux du Comité (15-24 oct 1907)*, necesis pagi 120 eŭrojn. Komuna foto de la kongresanaro de la unua UK en 1905 kaj la bindita volumo de "La Revuo" de la periodo septembro 1911 - aŭgusto 1912 atingis po 110 eŭrojn.

La rezulto de la aŭkcio iras favore al la Volontula Fondaĵo de UEA, escepte de 60 eŭroj kiel kontribuo al memorŝildo pri Gaston Waringhien en la liceo, kie li iam laboris kiel instruisto. Identaj ŝildo estis inaŭgurita en la kongresa semajno ĉe lia naskiĝdomo.

[gaz kom uea 585]

Mil dankoj pro la centa kongreso

kun kelkaj esperoj de ŝanĝoj

Jørgen Manniche alsendis la jenon por diskutigo. La redaktoro eldanigis.

Esperanto estas la rimedo modesta, ne la celo super siaj kapabloj, kaj tamen estas la fortaj, neŭtralaj kaj universalaj komunikadoj, la komprenemo, la kunlaboro, la paco. Tiuj celoj estis multfoje akcentataj dum la kongreso en Lillo, ekzemple en la filmo komence de la internacia kultura vespero.

Sed, karaj amikoj de la paco, de la estonteco, de la neceseco, ni devas montri la verdon, la tutecon, deziri al ĉiuj ĉeestantoj kaj mondanoj senti la mirindan plurismon de la tuta mondo, la kulturan diversecon de la tero, kaj serĉi tiun realigon kiun multaj nomas utopia, sed kiun meritas la tero kaj la homoj. Ĝi rilatas same al la interpopola renkontiĝo mem kiel al la scio de specialistoj, al la tuta sumo de apartaj vizioj kaj, kiel esprime de Zamenhof en la Espero, al la interkono, la toleremo kaj la eternaj ligoj malgraŭ la malkonsentoj, en la pliigatajn superrigardon kaj enrigardon, la konstanta scivolemo.

Sed eĉ en la sennombraj Esperantaj renkontiĝoj tutmonde Esperanto ne fariĝu celo transprenonta la mondajn kulturojn kaj 6000 lingvojn. Ni estas liberaj de apartaj lingvoludoj kaj aliaj nekomunaj posedaĵoj, estante malfermita rimedo de ekkono kaj amikiĝo, unu el la plej gravaj. Multaj kongresanoj elreviĝis pro tio ke malgraŭ la temo pri la kapablo de Esperanto por kultura perado, preskaŭ ĉiuj kantoj en ĉi tiu kongreso estis tradukitaj, tiel ke ni ne sentis la originalajn kaj belajn lingvojn kiuj konvenas al la melodioj. Esperanto mem estas plena de vivantaj nuancoj, sed devas antaŭenigi la aŭskultemon kaj ne minacu de ekstere la lokan kulturon. La koruso de la kongreso kantis la ĉefmelodion de Finlandia, kiun UN/Unesko post la lasta mondmilito prenis kiel sian mondan himnon kun bela anglalingva teksto:

*This is my song, oh God of all the nations,
a song of peace for lands afar and mine
Here are my hopes, my dreams
But other hearts in other lands are beating
with hopes and dreams as true
and high as mine.*

Jen mia kanto, ho Dio de ĉiuj nacioj
kanto paca por landoj malproksimaj kaj la mia
Jen miaj esperoj, miaj revoj
Sed aliaj koroj en aliaj landoj batas
kun esperoj kaj revoj same veraj kaj altaj kiel la miaj.

Ne tute neŭtrala, sed ankaŭ ne tiu dozo da himnoj oficiale planitaj. La kongreso multe atentis pri la pensoj de la pasinteco kaj malpli multe pri la novaj demandoj kaj problemoj, pri kiuj ni hodiaŭ devas akordiĝi, antaŭ estos tro malfrue. Se Esperanto volas la peradon, la komprenemon, la toleremon, la distribuon, la pacon, do jen kie ĝi devas certigi komunikadon, liberigi la homon, doni la parolon al pli da homoj. Dankon al la itala teatra trupo kaj al aliaj kiuj debatigis la miopecon.



*“Ĉiuj feliĉas”, teatraĵo de la itala Kolektivo Kontraŭkanto
(fotis Kalle Kniivilä)*

Lingvo, arto kaj valoroj en la dialogo inter kulturoj estis la temo de ĉi tiu kongreso. El Danio ni bedaŭrinde venis sufiĉe nepreparitaj por tiu ekstreme grava diskuto. Sed ĉu la kongreso levis nin? Multe distradis nin profesiuloj kaj amatoroj, bone komponita arto, kaj multajn malfermitajn kongresanojn ni renkontis. Sed la kongresejo estis fermita ĉiuvespere kiam la balo estis finita kaj la kunestado post la oficialaĵoj povus ekflori. Esperantistoj multe malfermas sin, kaj la kongreso pliigas la eblecojn kun multaj bonaj kadroj, sed partoprenis homoj el 80 landoj, kaj ni sukcesis nur malmultajn persone renkonti, kvazaŭ sur scenejo. Apenaŭ estis grupaj diskutoj, neniuj preparitaj demandoj krom tiuj al ekspertizistaroj. Ni multe sidis aŭskultante. Ni ofte renkontas la nomon Grundtvig ĉi tie kaj eksterlande, kaj la vivanta vorto estas ĉie kie oni allasas ĝin.

La mondo estas plena de riĉaj kaj malriĉaj landoj, grupoj kaj homoj. La mondo estas plena de konfliktoj, miskomprenoj, fremdiĝoj, malamoj, perfortoj, fendoj. La teron minacas naturkatastrofoj, pri kiuj la homo portas esencan respondecon. Kulturoj kaj ekonomia potenco strukturis niajn pasintecon kaj nuntempon kaj katenis personojn kaj kontinentojn. La celo de Esperanto estas liberigo sub la kondiĉoj de reciprokeco. Siajn progresojn hodiaŭ Esperanto faras en la tiel nomata tria mondo. Ĉu tio videblas en niaj konsistigoj – komitatoj, kongresoj aŭ la evoluo de la lingvo? Ŝajnas ke la kristanismo ankoraŭ karakterizas la kongreson, ankaŭ la oficialan parton, kiu devus certigi pli bonan ekvilibron, tiel ke Esperanto estos nova monda ponto.

Dum la unua parto de la internacia vespero ni vidis kontribuojn nur de iuj kiuj plurfoje prezentiĝis dum la kongreso. La ejon influis la elementoj de ĝuo kaj antaŭpreparita estetiko. La lingvo ja ĝuste kapablu unuigi la profesiulojn kaj la amatojn en komuna batalo kontraŭ tiu potenco kiu disigas la homojn kaj tiun terglobon kaj vivon, kiujn la aroganteco kaj senpoveco de la potenco siaaserte defendas. Malgraŭ la alta kvalito ankaŭ la internacia vespero ne sukcesis montri la diversecon, la povon de la kongreso kaj la temo.

Ni pasigis 1½ horojn por la festa vespero, duoblon de tio por dank-

paroladoj kaj honordiplomoj kaj 5 minutojn por la konkludoj de la temo. Mi aŭdis ekspertiziston diri pri la speciala kontribuo de Esperanto al Unesko, al kiu ni ligiĝis en 1954: “La aliaj venas kun siaj naciaj interecoj, ni samkiel Unesko mem venas kun la komunaj.” La plej multaj venas kun la konscio pri limoj. Ni volas transiri tiujn limojn kaj diversiĝi en la komunumo. Ni volas reiri de niaj kunvenoj kun tiaj inspiroj. Esperanto ne transprenu la aŭtoritatojn de la malmultaj kun simila aŭtoritateco. Ĝi ne estas grumblema malnova lingvo, sed kreita en la deziro de pli bonaj kontaktoj, aliecaj findecidoj, ŝanĝoj, dinamike realigita fabelo inter kontinentoj, najbaroj kaj la belaj lingvoj de la tutmondo kaj sinceraj volo.

Certe malmultaj revenis ricevinte nenion, sed la plimulto, malgraŭ la grandaj universalaj investoj, kredeble revenis sen efektive komunaj promesoj kaj espero. La kongreso havas cent jaroj da sperto, kaj ĉiufoje multe da praktikaĵoj devas akordiĝi kun novaj lokoj kaj tempoj. Sed ni portas kontribuon al pli bona mondo.

Jørgen Manniche (Danio, KN 1853)

Ĉu Esperanto finfine iĝas ĉef-flua lingvo?

Verŝajne vi opinias, ke la demando estas stulta, ĉar el landorganiza/kluba vidpunkto malkreskas la afero. La membraro maljuniĝas, pli kaj pli el ni forpasas kaj ne venas multe da novaj membroj.

Tamen ni ne ekploru, ĉar laŭ mia modesta opinio venas aŭguroj pri pli favora epoko Esperanta.

Pri kio mi parolas?

Dum la 293 membroj de la grupo fejsbuka “Amikoj de Dana Esperanto-Asocio” estas dormemaj, la membroj de aliaj grupoj, ekzemple “Esperanto” en kiu aniĝas 17,967 samideanoj, vigle babilis eĉ voĉe per

Messenger (voĉilo). En “Lingva Konsultejo” oni demandas pri gramatikaj problemoj kaj ricevas taŭgajn respondojn de eminentuloj kiel Bertilo Wennergren kaj Renato Corsetti. Troviĝas multaj aliaj grupoj Esperantaj en Fejsbuko, kiuj nur atendas scivolajn vizitantojn, kiel vin.

Pli kaj pli eklernas Esperanton per poŝtelefonaj programetoj. Jen kelkaj el ili:

- U-talk. Per ĝi oni povas lerni 128 lingvojn inkluzive Esperanton. Edukado.net informis partoprenantojn de Universala Kongreso pri ĝi. Tamen ĝi ne plu estas senpaga.
<http://eurotalk.com/blog/2015/07/13/language-of-the-week-esperanto/>
- Duolingo, kiu enkondukis senpagan saĝtelefonan Esperantan kurson pere la angla antaŭ du monatoj. La 10-an de aŭgusto la nombro de ĝiaj lernantoj estis 88 700, kaj la 14-an de aŭgusto la nombro jam kreskis ĝis 92 900.
<https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online>
- Alia efika lernilo pere de la angla estas Memrise.
<http://www.memrise.com/courses/english/esperanto/>

Ĉu ĉiuj el la novaj lernantoj de Duolingo kaj Memrise estas denaskaj angle-parolantoj? Ne, pro la fakto ke la angla estas la nuntempa internacia lingvo, multe da homoj bonege parolas la anglan, kaj tial ili ja povas profiti je kursoj por angleparolantoj.

Jen ses demandoj seriozaj kaj fine unu malserioza: Kial ili elektas lerni Esperanton? Ĉu la plejparto el ili baldaŭ rezignos kaj malaperos de Esperantujo? Kiom da ili membriĝos en UEA? Ĉu ili trovos aliajn vojojn? Ĉu ili restos nur en la virtuala Esperantujo? Ĉu muzikistoj, verkistoj kaj vortaristoj ĝojiĝas, ĉar ili supozas, ke baldaŭ ili vendos pli da siaj verkoj? Ĉu ni baldaŭ hisos la flagon, pro la alveno de la fina venko?

Demandoj bonas, respondoj eĉ pli bonos.

Betty Chatterjee (kiu Esperantistiĝis pere de la reto en la jaro 2005).

Komentoj de la redakcio

Ĉiam povas esti interese aŭskulti la kritikojn de niaj membroj – eble precipe de tiuj kiuj estas novaj, kaj sekve venas kun freŝa rigardo, sed samtempe tiel aĝaj ke ili havas komprenemon al tradicioj. Do dankon al Jørgen kaj Betty!

La inaŭguro en Lillo, laŭ mi, prezentis bonan ekzemplon de evoluigo kaj revigligo de tradicio. Unu inaŭgura tracidio estas la salutoj de landaj reprezentantoj. Ne ĉiuj scias limigi sin, do facile povas fariĝi teda afero, precipe ĉi-jare, kiam estis rekorda nombro da reprezentantoj. Tial la gvidantoj de tiu programero (UEA-estraranoj José Antonio Vergara el Ĉilio kaj Lee Jungkee el Koreio) unue petis la kongresanojn stariĝi laŭkontinente, tiel ke la tutmondeco de Esperanto klare reliefigis. La inaŭguro okazis en pluraj salonoj, kun televida konekto el la ĉefsalono. Dum la teda vico da landaj salutoj UEA-prezidanto Mark Fettes havis la bonan ideon iri en la aliajn salonojn por alparoli ĉiujn ĉeestantojn ankaŭ sen *teknika* fremdigo.

Jørgen pravus ke ni devus esti pli bone preparitaj pri la kongresa temo antaŭ ol iri al Lillo. Efektive okazis grupaj diskutoj, sed por partopreni en ili la kondiĉoj ja estas ke oni havu kontentigan lingvan nivelon kaj ke ne okazu io same interesa samtempe. Kaj eĉ kun bona lingva nivelo oni devas esti hejme preparita pri la temo, ĉar estas malfacile diri ĉu la diskutoj estis kontentigaj se oni ne antaŭe difinis kion ili kontentigu ...



Tamen, en Jutlando kelkaj homoj almenaŭ sciis prepari la *eksteran* mondon por la kongreso en Lillo. En Kolding eksa prezidantino de DEA, Tove Bak, invitis ĵurnaliston de la taggazeto Jydske Vestkysten, kiu la 27-an de julio aperigis grandan artikolon kun la titolo “Esperanto *ne* estas nura volapukaĵo”. En proksima Toftlund loĝas Kent Schneefeldt, kaj pri lia loka laboro por Esperanto aperis la 21-an de julio artikolo en la semajna gazeto MidtSyd (kun foto de li, reproduktita ĉi tie).

Vere impona tamen estis serio da du tutpaĝaj artikoloj en Weekendavisen, verkitaj de Arne Hardis, la 10-an kaj 17-an de julio. La unua (“Nuksoŝelo en giganta oceano”) temis pri la iniciatoj de Marie Schrøder kaj Frederik Skeel-Gjørting por krei danan Esperantomovadon, kaj la dua (“Al ĉiu homo propra mondlingvo”) pri la rolo de la eminenta dana lingvisto Otto Jespersen por la Ido-krizo. Hardis verkis la artikolojn sen ekstera instigo, sed li ne intencas fari artikolojn pri la posta evoluo de Esperanto en Danio.

Kiel li venis al tiu ideo? Eble ĉar venis lastatempe kvazaŭ lavango da akademaj libroj – anglalingvaj, kompreneble – kiuj traktas diversajn aspektojn de la Esperanta historio. Jam nur dum 2015 ĝis nun aperis Tomasz Kamusella: *Creating Languages in Central Europe During the Last Millennium*; Richard Kern: *Language, Literacy, and Technology*; Michael D. Gordin: *Scientific Babel: How Science Was Done Before and After Global English*; Will Abberley: *English Fiction and the Evolution of Language, 1850-1914*; kaj ne laste Roberto Garvía: *Esperanto and Its Rivals. The Struggle for an International Language*, kiu aspektas kiel rekta inspiro por la artikoloj en Weekendavisen. La simpatio al Esperanto de la kvin aŭtoroj estas treege diversgrada, sed ĉiuj prenas ĝin absolute serioze.

Ŝajnas do ke la prestiĝo de Esperanto nuntempe ne plu tiom dependas de la Esperantaj asocioj kaj ilia membronombro. Eble nia plej granda malhelpo estas la neprestiĝo de la nuntempaj kolegoj de Jespersen. Kiam vi lastfoje legis en la gazeto pri la progresoj de moderna lingvistiko?

Cetere, ĉu vi rimarkis ke ke Betty nomas la Anglan “la nuntempa internacia lingvo”, dum Jørgen nomas ĝin “eble ne tute neŭtrala”? Eble ni devus akordiĝi ke nacia lingvo lingvo internacie multe uzata reale estas imperia lingvo, kaj ne meritas la nomon “internacia”. Mi instigas vin ĉiujn aliĝi al la grupo “Amikoj de Dana Esperanto-Asocio” en Facebook, se vi ne jam estas tie, kaj diri vian opinion pri tiu afero kaj pri la ceteraj temoj prezentitaj ĉi tie de Jørgen, Betty kaj mi.

Jens S. Larsen

Kunvenoj en Kopenhago

KEK kunvenas lunde aŭ je la 12-a aŭ je la 19-a horoj en la “Kulturdomo” Tomsgårdsvej 35, 2430 Kopenhago NV.

Okaze de la tagmezaj kunvenoj bonvolu kunporti viajn sandviĉojn.

Pro la rekonstrua laboro en la kulturdomo ni ankoraŭ ne povas eniri la domon per la ĉefpordo. Anstataŭe oni devas eniri per la pordo ĉe la aŭtoparkumejo.

Aŭgusto

La 17-an je la 19-a en ĉambro B. Bent Jensenius gvidos la kunvenon. Plurpersonaj prelegetoj. Diversaj personoj prezentas diversajn temojn dum 10 – 20 minutoj. Ĉiuj estas bonvenaj KUN au SEN temo. Komputilo kaj projekciilo estos disponeblaj. Espereble estos kelkaj surprizoj.

La 24-an je la 19-a en ĉambro B. Ana Røssum kaj Mette Hjerting parolos pri siaj vojaĝspertoj en Turkujo – parto du. La unua parto okazis 22/6.

La 31-an je la 19-a en ĉambro B. Betty Chatterjee prelegos kaj montras fotojn pri akvo-projekto en DR-kongolanda urbo.

Kalima estas urbo en orienta DR-Kongolando. Post la militoj inter 1996 kaj 2003 la lando ankoraŭ multe suferas pro malsato, malsano kaj la manko de tiel nomata normala infra-strukturo. Ĉu ĉiuj el la loĝantoj rezignas pro malespero? Ne ĉiuj! Kamparana Solidareco estas neregistara organizo en Kalima, kiu ekde la jaro 2006 bataladas kontraŭ tiuj problemoj, per la helpo de subvencioj de germana firmao, Asocio de Verdaj Esperantistoj (AVE) kaj kelkaj bonfarantoj loĝante en Britio, Danio kaj Nederlando. Venu informiĝi pri la kuraĝaj klopodoj, modestaj sukcesoj kaj esperoj de Kamparana Solidareco.

Septembro

La 7-an je la 12-a horo. Venu renkonti nin ĉe Chillimilli, H. C. Andersens Boulevard 12, 1553 København V. Tie manĝante/trinkante ni Esperante babilos pri ĉio kaj nenio.

La 14-an je la 19-a en ĉambro B. Bent Jensenius gvidos la kunvenon, kies temo estos "Komunika ekzerco kaj/aŭ sekreta novelo."

La 21-an je la 19-a en ĉambro B. En Julio la gazeto Weekend Avisen aperigis du artikolojn pri la historio de Esperanto. Ĉu la artikoloj favore/malfavore, vere/malvere prezentis la historion de nia ŝatata lingvo? Venu pridiskuti la temon.

28-an je la 19-a en ĉambro B. Bent Jensenius gvidos. Plurpersonaj prelegetoj. Diversaj personoj prezentas diversajn temojn dum 10–20 minutoj. Ĉiuj estas bonvenaj KUN au SEN temo. Komputilo kaj projekciilo estas disponeblaj. Espereble estos kelkaj surprizoj.

Oktobro

La 5-an je la 12-a: Betty Chatterjee gvidos studgrupon. Ni daŭre legos la membiografion de Carl Nielsen. Ni legos la paĝojn 77 – 88.

La 12-an ne estos programo pro la aŭtuna ferio.

Kolokvo pri Esperanto-instruado

Mireille Grosjean, prezidantino de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) persvadis la kantonon de Neŭŝatelo, Svislando, inviti la *Trian Tutmondan Kolokvon pri la Instruado de Esperanto* en Neŭŝatelo kaj La-Chaux-de-Fonds inter la 13-a kaj la 16-a de majo ĉi-jare. La du antaŭaj kolokvoj okazis en Ĝenevo 1922 kaj Prago 1927! Ĉeestis multegaj konataj nomoj el la Esperanto-instruista mondo, prezentante siajn rezultojn por komuna diskuto.

La kolokvo konklude konstatis ke la reagoj de la invititaj ŝtatoj estis kompare al la unuaj du konferencoj magraj, kvazaŭ forvaporiĝis la oficiala interesiĝo pri la lingvoproblemo (kun escepto de Slovakio, kies reprezentanto aktive partoprenis en la evento). Aliflanke evidentiĝis ke, kiel la altnivelaj kontribuoj montris, la Esperanto-movado evoluis el pionira rondo al matura lingva komunumo kaj okazis profesiiĝo precipe en la kampo de Eŭrop-normaj ekzamenoj. La Esperanto-movado devas koncentriĝi al kontribuado al daŭripova evoluo, al atentigo pri lingva diskriminacio kaj al lukto por libera aliro al scio kaj edukado por ĉiuj homoj. Grandaj ŝancoj por la Esperanto-movado ekzistas precipe en Afriko.



(Fotis Dietrich Michael Weidmann)

Pri la ILEI-konferenco



La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kongresis en Ostendo, Belgio, la semajnon antaŭ la Universala Kongreso en Lillo. Raportas pri ĝi la partoprenintoj Ileana Schröder, Thomas Lythje kaj Jonas Dalmose.

La 48-a Konferenco de ILEI (la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj) estis inaŭgurita en la 18-a de julio en la festsalono de la urbodomo de Ostendo, ĉemara urbo en Belgio. Same kiel antaŭ unu jaro urbestro de la konferenca loko bonvenige alparolis la kunvenintajn instruistojn. Tiuj efektive plenigis la festosalonon en Ostendo; la nuna konferenco viciĝas inter la kvar plej grandaj de la pli ol sesdekjara ekzisto de ILEI.

La urbestro de Ostendo, S-ro Jean Vandecasteele, aludis al la agnosko de Esperanto fare de Unesko en 1954, ankaŭ al la rolo de la flandra marbordo dum la du mondmilitoj, kiun reflektis nia konferenca temo “Longa Paco post Grandaj Militoj”. Li elstarigis la longan historion de Esperanta agado en la urbo, kiu en 1987 unuecigis sin sub la ombrelo de la loka klubo “La Konko”, kies membroj regule kunlaboras kun la urbaj instancoj. Kelkaj tiaj iniciatoj dum la konferenca semajno donos perfektan eblon vidigi sin. S-ro Vandecasteele aludis tion: “Dank’ al la plena organiza komitato de speci-

alistoj, varia programo estas preparita, kie ankaŭ eblas konatiĝi kun la lokaj loĝantoj. Estas la ŝanco por montri al ostendanoj kaj turistoj, ke Esperanto estas vivanta lingvo.”

Aldone al denombrado de la multaj allogaĵoj de la urbo, li anoncis la lastatempan decidon nomi gravan novan straton “Esperanto-Aleo” en nove konstruata urba kvartalo.


Post la urbestra alparolo la prezidanto de ILEI, s-ino Mirejo Grosjean, legis omaĝon pri la personeco kaj agado de Edward Symoens, kiu longtempe estis prezidanto de la Ligo. Sekvis saluto de Ariadna Garcia Gutiérrez el Kubo nome de la junularo. Ŝi esprimis la deziron, ke TEJO kaj junuloj kunlaboru pli proksime kun ILEI pri siaj instruaj projektoj. Salutis Stefan MacGill, vic-prezidanto de UEA, kiu emfazis la gravecon de edukado en defendado de la paco kaj la aktivan rolon, kiun povas kaj devas ludi la esperantistaj instruistoj. Sekvis proklamo de la unua aljuĝo de la Premio Mauro la Torre (kiu mem prezidis la Ligon inter 1998 kaj 2003). Tion ricevas D-ro Davide Astori el Italio pro kompara studo de du tradukoj de la itala klasikaĵo “Pinokjo”.

La malfermo finiĝis per komuna fotado ekster la urbodomo kaj bonveniga koktelo flanke de la urba registaro.

Ileana Schröder

La konferenco enhavis multajn malsamajn trakojn, speciala estis unu por homoj kiuj instruas Esperanton, kaj tiun mi partoprenis. Bedaŭrinde mi dum longa tempo estis for de Esperantujo, do mia Esperanto dum longa tempo malboniĝis. Estis iom strange partopreni konferencon pri instruado de Esperanto kiam mi apenaŭ povis esprimi min. Bonŝance mia lingvo ne estis pli malbona ol mi povis kompreni efektive ĉion. Kaj estis multaj aŭskultindaj temoj.

Mi estas instruisto en gimnazio, kie mi instruas fizikon kaj matematikon. Mi konas instruadon kaj ankaŭ estradon pri instruado, sed ĉi tiu kurso/konferenco estis tre bona kaj agrabla ĉar la temoj estis pretaj kaj rekte aplikeblaj.



Thomas Lythje, Michael Branbjerg kaj Jonas Dalmose prezentas siajn atestilojn

Krom tio la konferenco kompreneble ankaŭ estis parto de Esperantujo kun la avantaĝoj kiuj estas; Multaj interesaj homoj de diversaj kulturoj, lingvoj kaj landoj. Mi denove memoris kial mi amas la ideon, kiu interligas nin. Mi ne povas memori la precizan numeron, sed mi pensas ke ni estis proksimume 130 homoj ĉe la kongreso. 130 homoj de 6 kontinentoj, eĉ Jonas ŝercis ke li estas de Antarkto, tiu estis la sola kontinento kiu mankis al la kongreso. Ni estis de ĉirkaŭ 30 landoj. Tio signifas ke ĉiuj etnoj, multaj manĝ-manieroj, pluraj pensmodeloj kaj ideologioj estis reprezentitaj. Mi mem parolis precipe kun du homoj de Kubo, el kiuj unu estis mia samĉambrano, viro de Nikaragvo, virino de Sudkoreo kaj alia de Ĉinio, kaj malgranda grupo el Armenio, kaj kompreneble la danaj homoj.

Mi ne volas paroli pri la enhavo, tamen, mi volas mencii unu aferon, kiu eble estos tre interesa por multaj legantoj: DuoLingo.

DuoLingo estas nova retpaĝo/programo. Ĝi estas senkosta kaj sen reklamoj. DuoLingo preskaŭ estas ludo, sed kiam vi ludas, vi lernas. Vi povas lerni multajn lingvojn ekzemple la hispanan, germanan kaj ankaŭ la danan kaj Esperanton. La ideo, laŭ mi, estas genia. Mi pensas ke DuoLingo estas parto de Guglo.

DuoLingo pagas multajn homojn por krei multajn kursojn. Kiam homoj “ludas” ili volas, ke tiuj dum sufiĉe longa tempo, alvenos al parto nomata “enmergiĝo” (immersion).

En tiu parto la lernantoj tradukas realajn tekstojn. Kelkaj estas sen aŭtorrajto, ekzemple el Vikipedio. Do ludante vi lernas kaj helpas al Guglo traduki dokumentojn. Laŭ mi, la elpensinto meritas la Nobel-premion. Kompreneble Guglo ankaŭ volas gajni monon. Do aliaj tekstoj estas por firmaoj, organizoj kaj homoj kiuj bezonas tradukiston.

Aktuale la kurso de Esperanto nur estas en beta kaj aktuale la “enmergiĝo” bedaŭrinde ne estas parto de la Esperanta kurso.

Mi ne sentas min preta por instrui grupon nun, - sed espereble post malmultaj monatoj mi estos. Mi mem uzas DuoLingon (kaj aliajn metodojn) por pretigi min.

Thomas Lytje

Mi tre ĝuis la internacian etoson. Estis bonege ke Erasmus pagis mian vojaĝon kaj restadon en Oostende. Sen tiu helpo mi verŝajne ne partoprenus. La vetero estis sufiĉe malinteresa por mi, la akvo de la maro estis malvarma, sed tio estis bona por nia studemo. Ni diligente partoprenis la diversajn aktivaĵojn, tamen estis la ĉiama problemo ĉe kongresoj ke se oni aliĝis al unu afero ne eblis samtempe partopreni paralelan aferon kaj pro la pagado de Erasmus ni kelkfoje estis devigataj partopreni partojn kvankam la paralelaj aktivaĵoj estis pli interesaj.

En la instruista trejnseminario ni lernis pri lernado per sociaj ludoj kiel “Triviala postkurado” aŭ “Homlupo”. Tio kion ni lernis estis sufiĉe interesa kaj uzebla hejme. Multaj el la ludoj troviĝas en edukado.net kie ili estas elŝuteblaj.

Ni lernis ke la korpa lingvo estas tre grava kiam oni instruas; ekzemple la vizaĝo konsistigas 30% de la komunikado kaj la parolo malpli ol 10%. Kiam oni instruas kaj la studentoj timas, oni povas klini la kapon por aspekti pli ĝentila.



Estis interesaj babiladoj kiuj pludaŭris post la fino de la komuna manĝado. La komuna manĝado estas granda avantaĝo de kongresetoj kaj konferencetoj kompare kun Universala Kongreso, kie oni ofte ne kune manĝas. Estis tiel bonetose kaj amikeme manĝi kune.

La manĝaĵo estis ĝenerale bona, sed bedaŭrinde ne ekologia. Tamen mi sukcese vizitis la grandegan ekologian sanvendejon de la urbo por aĉeti bonajn varojn dum la libera tempo. Speciale la ĉokolado de Belgio estas manĝinda. Mi trovis tre bongustajn, veganajn, ekologiajn, senalkoholajn, justkomercajn, sensukerajn delikatajn ĉokoladojn doĉigitaj per stevio anstataŭ sukero. Se vi iam venos al Belgio vi nepre gustumu la ĉokoladojn!

Jonas Dalmose

Medalo pro Esperanto

Edward Kozyra, konata Esperanto-aktivulo kaj propagandisto de la internacia lingvo, vic-prezidanto de la Pollanda asocio “Eŭropo-Demokratio-Esperanto”, ricevis la Bronzan Krucon de Merito pro la promociado de Esperanto.



La premiado okazis en la Ŝekspira Teatro en Gdansko kadre de la konferenco “25 jaroj de memregado. Defioj por la venontaj 25 jaroj”. Komisiite de la Pollanda prezidento Bronisław Komorowski, la Pomeria vojevodo Ryszard Stachurski enmanigis la Oran Arĝentan kaj Bronzajn Krucojn de Merito. Inter la tri laŭreatoj de la Bronza Krucon de Merito estis do Edward Kozyra, ricevinta la ŝtatan distingon pro la promociado de Esperanto.

La ceremonion ĉeestis, interalie, Bogdan Borusewicz, prezidanto de la Pollanda Senato, Pomeriaj senatanoj, lokaj aŭtoritatoj. En la festa ceremonio Edward Kozyra transdonis al kelkaj el la altrangaj ĉeestantoj sian freŝe eldonitan preskaŭ dumilpaĝan kvinvoluman Esperantan-anglan-polan vortaron.

[el La Ondo de Esperanto]

Aktivaj skoltoj

La 8-an de aŭgusto finiĝis la 23-a Monda Ĵamboreo de Skoltoj en la prefektujo Yamaguchi. Mondaj ĵamboreoj (skoltaj kongresoj) okazas unufoje en kvar jaroj kun ĉirkaŭ 34 mil partoprenantoj el 150 landoj.

Dum la ĵamboreo funkciis Esperanta budo, en kiu ĉiutage multaj skoltoj povis aŭdi pri Esperanto, partopreni etajn lecionojn de la lingvo kaj ricevi bazan lernolibreton. La standon vizitis ankaŭ la nepo de la fondinto de la skolta movado, Baden Powell.



La standon organizis kaj gvidis ges-roj Hotta el Osaka. Ili proprakoste venigis du skoltajn geesperantistojn el Venezuelo kaj Malajzio (kiuj ĉiutage deĵoris sur la stando), eldonis lernolibretojn kaj mendis T-ĉemizojn, kiujn portis esperantistaj helpantoj ĉe la budo. Pro la samtempe okazanta UK la helpantoj estis malmultaj kaj plejparte nur mallongtempaj.


La ĵamboreo daŭris tutan semajnon, kaj la stando funkciis de la naŭa ĝis la kvina kun lunĉa paŭzo. Ĝi lokiĝis en granda tendo kune kun aliaj kulturtemaj budoj. La stabanoj kune kun skoltoj devis elteni sufokan varmegon kaj kreskantan lacon, estante ĉiam pretaj por klarigi pri Esperanto en ĉiuj konataj de si lingvoj. Pluraj junuloj montris honestan intereson pri la lingvo kaj ĉe la fino amike salutis la stabanojn per ĵus lernita: Dankon! Ĝis revido! Aŭdi tion de centoj de gejunuloj estis granda plezuro de la stabanoj!

Aleksandra Watanuki

Recenzeto

L. Zamenhof: Kongresaj paroladoj

Serio Scio. Volumo 2, 2-a eldono, Kaliningrado, Kaunas, 2015



El la antaŭparolo:

De 1905 ĝis 1912, Zamenhof elvokis antaŭ la kongresanoj ĉiujn grandajn demandojn, ĉiujn grandajn problemojn, kiujn la vivo metis al tiu senprecedenta socia-lingva movado, kaj la altajn celojn, kiujn ĝi devas aspiri. La kolekto de tiuj kongresaj paroladoj [...] estas emocia kaj animaltiga legaĵo, unu el tiuj nemultaj verkoj, kiuj honorigas la homaron, – skribis Gaston Waringhien en sia biografia skizo pri Zamenhof.

Por ke ĉi tiuj gravaj tekstoj estu je dispono de la esperantista legantaro, Sezonoj decidis reeldoni la ok “oficialajn” paroladojn, faritajn de Zamenhof je la malfermo de la ok unuaj Universalaj Kongresoj de Esperanto.

Por mi estas vere interese legi liajn propajn vortojn, ekzemple pri ‘la interna ideo’. Tiun tekston (2a prelego) li ne laŭtlegis en Ĝenevo 1906. Sed vi trovas la tekston en tiu ĉi libro. Aĉetebla en nia LibroServo.

Tara Gregers

UEA en grava forumo de Unesko

Kunlabore kun Korea Esperanto-Asocio, nome de UEA, tri koreoj ĉeestis en la Monda Eduka Forumo organizita de Unesko de la 18-a ĝis la 22-a de majo en la urbo Incheon, Koreio.

La tri personoj estas LEE Jungkee, estrarano de UEA, LEE Young-koo, prezidanto de KEA kaj Park Yong-sung, sekciestro de ILEI-Koreio. La slogano de UEA por la forumo estas “Edukado por Mondo de Najbaroj”, Apud la forumejo, Esperanto-budo estis starigita, permeson por tio ricevis nur naŭ Neregistaraj Organizaĵoj. Tio simbole diras, ke Esperanto estas unu el la gravaj organizaĵoj en la internacia komunumo. Oni taksis, ke du mil konferencanoj plus klasgrupoj kun instruistoj vizitos la budojn, KEA sekve presis tri mil trilingvajn flugfoliojn por disdoni kune kun Esperanto-nasztukoj.

[EKO 2015-20 de UEA]



Kontakto kun Zambiano: S-ro Limbani Eliya Nsapato de la Afrika Ret-Kampanjo pri Edukado por Ĉiu.


Estrarano Lee Jungkee kune kun sia najbaro en la konferencaj kunsidoj, el la pacifika nacio Vanuatu, la prezidanto de la Koalicio pri Eduka Politiko de Vanuatu.





La 6-an de junio oni celebris la “Mangfoldighedsdag” (Tagon de Diverseco) en la urbodomo de Frederiksberg, Kopenhago. Ĉeestis ankaŭ la esperantistoj kun budo. Jen Arne Casper kaj Tara Gregers antaŭ la volvebla tabulo de DEA.

Ĉar Peter Wraae organizis busan komunan vojaĝon al Lillo, la pasaĝeroj decidis premii lin per donac-karto al la tiea Libroservo.



Survoje hejmen nia membro Michael Branbjerg kaj Martin Strid el Svedio distris nin per popola muziko.